Luise Hensel,

Aŭtun-sopiro

tradukita de Manfred Retzlaff

La birdoj forflugintas,
Malfloris jam la lasta flor',
Ĉielo griziĝintas,
Forardas suna glor'!
Somero, ho somero,
Ĉarm' via iĝas for.

La norda vent' forpŭsis
La helan brilon super ni,
Kaj kion li ne tuŝis,
Ekdormas tio ĉi.
Ho vintro, aĉa vintro,
Malĝoja estos vi![2]

Traduko de la Germana poemo "Herbst-Seufzer" de Luise Hensel *(∗30.03.1798 – †18.12.1876) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2014-11-03.*

Arg-1096-2210 (2014-11-03 12:20:18)

[2] aŭ: Tristeca estas vi!